

La Riverego

kebekia esperantista bulteno

Decembro 2006

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 21, No 86

Tajlanda turismo por vakeroj

Stéphanie Bellenger



*Azio, inter religio, malriĉo kaj turismo.
Ĉi-tie en Birmanio. Photo per Stéphanie Bellenger*

Post Sudameriko, Hades daŭrigas sian vojaĝon cele al observado de la okcidenta turismo kaj de ties influo al lokaj kulturoj. Raportaĵo en Azio, en Bangkoko, Urbo de la Anĝeloj, kaj de la seksa turismo.

Strato Khao San. Vagejo por vojaĝantoj. Regas senrivalaj murmurego kaj klopodo, superas la straton lumŝildoj de okcidentaj firmaoj kaj de malmultekostaj

hoteloj. Trairas vojaĝantoj, lacaj okuloj, dorsosakoj. Elektronika muziko laŭtegas kaj ritmas la senĉesan tien-kaj-reen iradon de *tuk tuk-ĉaroj*. Surfone, kun vizaĝoj polvorkovritaj laŭ orientazia stilo kaj lipoj ŝminkitaj, apenaŭ vestitaj junaj Tajlandaninoj altsidas ĉe stratvendejo de miksdrinkaĵoj kaj esperas baldaŭ renkonti sian «dolĉan paĉjon».

Ligna breto sur motorbiklo uzatas kiel servotablo. Nudeloj brue fritatas en gisaĵa ŭoko. Sojĝermoj sur alumina plato. Antaŭkiritaj verdaj legomoj kaj arakidoj atendas en plastaj bovloj; salo kaj kareo en glasoj; kaj ovoj, en akvositelo rekte sur la selo de tirada motorbiklo. Ĉi-tie, po dek ses horoj tage, apenaŭ dudekjara Lin pretigas *Pad Thai-on* (tajlandan frititan nudel-manĝaĵon), kontraŭ 470 badoj (10 eŭroj) en tago. Per preciza kvankam eleganta kaj arabeska mangesto, li ree nodas sian brilbluan antaŭtukon, sub kiu ekvideblas stikaĵoj de ina brusto.

Lin, fervora buddismano, estas transgenrulo.

Barakurbo. Lin kaj la aliaj tre malriĉaj familianoj forlasis la kamparon de la *Chao Praya-a* delto por kune ekloĝi en kvarkvadratmetra ejo hejtita per lignokarbo, sub ĉifita lada tegmento, en antaŭurba barako apud la fervojo kiu ligas Bangkokon al urbo Chiang Mai.

Mia *pad thai* finfritatas en la ŭoko. Mi silente rigardas straton Khao San. Mia spiro haltas. Urba ĝangalo : abundego, stimuleco, troeco. Ankaŭ eĉ maldececo, kiu foje paradas kun altaj kalkanumoj sur pavimita strato.

Lin iom reŝminkas sin dum li sidas, la kruroj krucigitaj, enmuldataj en ĝinzo. Li fiere montras al mi la vundmarkon de la lasta ĥirurgia operacio por aldono de artefaritaj mamoj. La transformigon li kompletigas per ĉiusemajna injekto de hormonoj. Transgenra, li estas. Sed ulino, li volas esti.

Sed ne kiel tiuj, kiuj montraĉas sin maldelikate vestitaj kaj ŝminkitaj sur la scenejo de iu *katoey* (transgenrula) kabaredo de Thanon Sukhumvit. (*sekvo en la 2^a paĝo...*)

Tajlanda turismo por vakeroj (sekvo)

Stéphanie Bellenger

(sekvo de la 1^a paĝo)

Lin volas esti vera ulino, sen troaj ornamaĵoj aŭ trompaĵoj. Li volas sin parfumi, juvelojn surhavi, esti amata kaj respektata en socio, vivi en mildeco, malkrudeco kaj delikateco, forlasi porĉiame la tegmenton el ĉifita lado, forlasi la *pad thai-ojn*. Lin revas pri okcidento. Mi, ina, aŭskultas kaj provas kompreni. Esti ulino. Profunda certeco. Li tion diras al mi, kaj okulfiksas sian poŝspeguleton. Amuleto pendas je la koro. Larmoj aperas, li ridetas al mi. Anĝelo, videbla sub lumo de la semaforoj.

Malĝojemo. Novicoj, kun kapo razita, okro-kolore vestitaj, almozpetadas de pordo al pordo kun lakita ligna bovlo en la mano. Lin ankaŭ iam estis monaĥo. Antaŭ sia altaro, kiu similas pupdomon, li kunigas la manojn kaj praktikas dharmaron por ŝirmi sin kontraŭ sufero,

malkontentemo kaj malgajemo (*dukkha*).

«*Mi ne estas en Tajlando nur por la ruinoj!*» flustras en la orelon de Lin kvindekjara turistino, fiera subtenanto de seksturismo. Pli kaj pli da viroj venas en Tajlandon por ulinoj. Ankaŭ foje por viroj. Mia *pad thai-a* pretiganto, kape kaj tutkorpe kliniĝas antaŭ tiu malgraciforma ventro. Li kun fascino rigardas la turistinon. Per siaj salivplenaj lipoj la maljunulo mendas. Mi silente observas. Ena kolero. Abomeno al tiu ulo. Mi timas pri Lin.

Aĉeto de karno estas kutima komerco en Bangkoka nokto, ĉefe en tuicelaj masaĝejoj kaj drinkejoj de strato Thanon Sukhumvit. La iam pionira karnaĉetejaro *Soi Cowboy* (vojo de vakero) proponas al viraj klientoj eblecon liberigi unu el la junulinojn kontraŭ kelkaj monbiletoj. Aliaj junulinoj dume trejniĝas por skribi amleterojn al

siaj novaj «dolĉaj paĉoj» en apuda retakafejo.

Mi ekstaras, kaj forlasas iun infanon en vojo kiu ne estas mia. Kion fari por halti ĉi tiun plagon, kiu iĝis lasta espero de multaj? Kion fari por halti nian konsumisman socion, kiu instigas duvizaĝan mondon kaj kondukas siajn infanojn hazardi sian vivon por tiu damna feliĉo pri kiu ili revas rigardante televidajn seriojn?

Esperantigis :
Boris-Antoine Legault
kaj Emmanuel Villalta

Stéphanie estas ĵurnalisto kaj raportas pri siaj vojaĝoj france kaj esperante ĉe
<http://hades-presse.com>
kaj ĉe <http://eo.hades-presse.com>



Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Vincent Riendeau (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (viceprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Vincent Riendeau (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2007.03.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Sukcesa novembra laborbrigado en Montreala Esperanto-Domo

Boris-Antoine Legault

En la 11^a de novembro kuniĝis ses laboremaj Esperantistoj por antaŭenirigi projektojn ĉe Montreala Esperanto-Domo.

Laborante dum kvin horoj, la kuraĝuloj sukcesis detale katalogi kvindek da libroj, kiujn ESK intencas donaci al BAnQ (Naciaj Biblioteko kaj Arĥivoj de Kebekio). La instiganto de tiu projekto estas Normand Fleury, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia :

«En urba biblioteko de Toronto estas pli ol 350 haveblaj titoloj pri aŭ en Esperanto. Dume, en tutkebekia nacia biblioteko troviĝas apenaŭ kvindek da titoloj, kiuj rilatas al Esperanto. Okazigo de TutAmerika Kongreso de Esperanto en Montrealo en julio 2008 donas al ni plian kialon por pledi al BAnQ kaj al aliaj kebekiaj bibliotekoj (urbaj, universitataj, ktp) por pli da libroj pri kaj en Esperanto. Sed tio ne okazos per si mem. Ĝi postulos

laboron niaflanke.»

Alia plenumita projekto, gvidata de Martin Benoit, estis kontrolado de havebla kvanto kaj informo pri ĉiuj libroj de libroservo de KEA. Nun, aĉetontoj de iu libro povas facile sciiĝi ĉu ĝi estas havebla en la libroservo pere de la retkatalogo de KEA : www.esperanto.qc.ca/katalogo/

Krome, tiu laboro ebligis al la

responsuloj de la libroservo multe pli efike pritrakti ĝin.

Pluraj aliaj projektoj bedaŭrinde ne estis plenumitaj, pro manko da homfortoj. La sekvonta laborbrigada tago okazos iam komence de jaro 2007. Ĉu vi ŝatus partopreni aŭ eĉ pli bone organizi la sekvontan laborbrigadan tagon? Bonvole kontaktu la sekretario de ESK ĉe sekretario@esperanto.qc.ca



Laborbrigada tago en novembro 2006. Ne nur laboro...

Nova klubo

Dominique Baron

Bona novaĵo en Tours! La 5^{an} de oktobro, mi sukcesis starigi Esperantan klubon en mia kolegio. Ĉiuĵaŭde, de la 17^a ĝis la 18^a horo partoprenas la kurson 6 personoj : 4 gelernantoj kaj 2 geinstruistoj.

Por pruvi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, mi petas de la tutmonda Esperantistaro sendi

kuraĝigan poŝtkarton al la suba adreso. Sur tutmondan mapon mi fiksos kolorajn pinglojn por signi de kie venas la ricevitaj poŝtkartoj. Ni montros la tuton dum publika tago en marto 2007.

Ĉu vi konsentus fari tion ? Ĉu vi povus paroli pri tio al via loka grupo, al viaj korespondantoj ?

dominique.baron4@free.fr

**Institution
Notre Dame-St Vincent**

Club d'Esperanto (D.Baron)
30 rue Delperier
BP 5813
37058 Tours Cedex 1
France

Eklaboru!

El la Eklaboru teamo

La 15^{an} de novembro 2006 estis la 5-jara datreveno de la Vikipedio en Esperanto. Por festi, ni decidis lanĉi tute novan retprojekton kiu eble estos same grava por la Esperanto-movado: la retejo www.eklaboru.com, kie ĉiu povos trovi laboron aux laboranton per Esperanto, por praktike uzi nian lingvon.

Danke al la Interreto, nuntempe ekzistas multaj eblecoj labori per Esperanto, ĉar oni ne plu devas esti surloke. Ekzemple, mi povus dungi programiston kiu loĝas en Rusio kaj li laborus rete. Tiu estas avantaĝo por mi ĉar lia salajro estus malpli alta ol la salajro de germana programisto ekzemple, sed ankaŭ estus avantaĝo por li, ĉar la salajro ja estus pli alta ol normala rusa salajro.

Eklaboru.com tamen ankaŭ faciligas dungi homon por labori loke, ekzemple vartisto kiu instruos

Esperanton al infanoj. Tiel gejunuloj povas plibonigi ilian lingvokonon kaj sperti alian landon.

Ni kredas ke tiu estos gravega paŝo por Esperanto ĉar laboro ja estas grandega parto de la homa vivo kaj ĝis nun ĝi estis eble la unika parto kiun oni ne povis fari en Esperanto. Se oni volis dungi Esperantiston antaŭe, oni devis havi bonegajn kontaktojn ene de la movado por trovi eĉ nur unu taŭgan kandidaton. Tio ne nur estas temp-malŝpara sed ankaŭ neprofesia kaj malallogas neesperantistojn.

Nun per nia retpaĝaro ĉiu povas interkonatiĝi kaj trovi laboron aŭ laboranton - do vizitu www.eklaboru.com, kontribuu kaj ankaŭ informu viajn amikojn!

Fonto: Ret-info, www.eventoj.hu

Nova por Esperanta Montreala retejo

Boris-Antoine Legault

Aperis nova plurlingva (nune: esperanta, franca, angla) retejo por Esperanto en Montrealo: www.esperanto-montreal.org. Ĝeneralaj celoj de la paĝaro estas logi Montrealanojn al Esperanto kaj logi Esperantistojn el la tuta mondo al Montrealo.

Ĉi-retejo ankaŭ kompletigos la informriĉan retejon de ESK je fleksebla paĝaro per kiu oni rapide povas anonci pri kursoj aŭ blogumi

pri Montreala Esperanta okazaĵo. Mi kreis la retpaĝaron, tamen ĝi ne plu estu mia, sed nia! Mi do esperas, ke pluraj homoj pretos kunlabori por ĝisdatigi la kalendaron, aldoni blogaĵojn, bildojn, informojn pri Montreala Esperanta asocio aŭ projekto, kaj ĝenerale plibonigi kaj pliriĉigi la enhavon. Ĉio-ĉi plifortigos nian movadon! Se vi volas aktive helpi pri la paĝaro, vizitu la retejon kaj ekpartoprenu!

Un DVD pour Noël

Normand Fleury

Il n'entrera peut-être pas facilement dans le bas de Noël, mais au moins il entrera facilement dans votre lecteur de DVD et finalement, c'est ce qui compte!

Je vous invite à découvrir le DVD *Esperanto électronique*, qui contient le matériel le plus abondant, le plus diversifié et le plus complet sur la langue et le mouvement *esperantophones*. Vous y trouverez de la musique, des jeux, des logiciels, des outils pour apprendre la langue, des magazines, des livres, des photos de rencontres, un film, etc.

Comme le dit si bien le texte sur la pochette: « *Ce DVD a été créé dans le but d'informer sur l'espéranto, de donner la possibilité de l'apprendre à ceux qui le souhaitent et de présenter des éléments de la culture de l'espéranto* ».

Si vous commandez ce DVD d'ici la fin de l'année 2006, vous bénéficiez d'un prix spécial de 10 \$ incluant les frais postaux (25 \$ pour trois DVD).

Donc, demandez-le au Père Noël; je suis certain que votre vœu sera exaucé!

libroservo@esperanto.qc.ca
ou informo@esperanto.qc.ca

Nouveau site internet pour l'espéranto à Montréal

Boris-Antoine Legault

Un nouveau site internet multilingue (espéranto, français, anglais) pour l'espéranto à Montréal vient d'apparaître: www.esperanto-montreal.org. Parmi les buts généraux du site, on retrouve bien sûr « stimuler l'intérêt des Montréalais-e-s pour l'espéranto », mais aussi encourager les espérantistes du monde entier à

visiter notre ville et démarrer des projets commun transnationaux et « transurbains » avec notre mouvement local d'espéranto.

Le nouveau site pour l'espéranto à Montréal permet aux espérantophones de la région de Montréal d'annoncer facilement des cours, des pages de blogues,

ou d'ajouter des événements au calendrier, et complète donc bien le site de la Société québécoise d'espéranto, qui de son côté renferme beaucoup d'information sur la langue et le mouvement espéranto. Pour en savoir plus et participer activement, visitez le site!

Invitation à Montréal

Normand Fleury, président

Au cours de 2007 et 2008, Montréal sera l'hôte de diverses rencontres espérantistes. Vous avez peut-être déjà entendu parler de MEKARO et de SEBO, mais à ces deux acronymes s'ajoutera celui de TAKE.

Laissez-moi vous expliquer un peu le tout! Primo, en mai 2007, Montréal accueillera la 5^e rencontre d'espéranto du Canada central (MEKARO). L'an dernier, cette rencontre a eu lieu à Ottawa et le tout fut fort réussi grâce aux efforts de Merle Haltrecht-Matte et de Suzanne Caron-Richer. MEKARO alterne d'une année à l'autre entre trois villes (Toronto, Ottawa et Montréal). Revoici donc le tour de Montréal et de la SQE d'organiser cette fin de semaine amicale, de tourisme et de découverte en espéranto.

Secundo, pour une 7^e année, les cyclistes espérantophones pourront prendre part à la fin de semaine *Espéranto et vélo* dans le cadre du *Tour de l'île* et de *Un tour la nuit* de Vélo Québec. Je pense que SEBO est assez unique en Amérique. BEMI (Mouvement cycliste mondial espérantophone) organise depuis fort longtemps des caravanes et des rencontres cyclistes en Europe et parfois en Asie, mais il s'agit d'un événement inusité en Amérique. Donc, si le vélo et l'espéranto sont vos passions, soyez-y!

Finalement, l'événement le plus important au Canada de la décennie, TAKE (Congrès panaméricain d'espéranto) se tiendra à Montréal en juillet 2008. La Commission d'espéranto des Amériques a accepté l'invitation de la SQE de tenir le 7^e congrès au Québec.

Nous attendons plus de 150 participants puisque simultanément se tiendra le 56^e congrès états-unien d'espéranto. TAKE est une chance exceptionnelle de rencontrer, d'échanger et de partager de bons moments avec des espérantophones de Cuba, du Mexique, du Brésil, en plus de ceux des quatre coins des États-Unis et du Canada.

Retenez bien les dates, du 12 au 18 juillet 2008, c'est un rendez-vous dans le monde de l'espéranto.

Nous vous invitons à consulter régulièrement le site web : www.esperanto.qc.ca

Il nous fera plaisir de répondre à vos questions et d'accueillir vos suggestions concernant les trois rencontres précitées. En 2007-2008, Montréal vibrera un peu plus...au son de l'espéranto!

Montrealo invitas

Normand Fleury, prezidanto

En 2007 kaj 2008, Montrealo gastigos diversajn Esperantistajn eventojn. Vi eble jam aŭdis pri MEKARO kaj SEBO sed al tiuj du renkontiĝoj aldoniĝos TAKE.

Nu, mi klarigu al vi pri kio temas. Unue, dum majo 2007 okazos la 5^a MezKanada Renkontiĝo. Pasintjare ĝi vere sukcese okazis en Otavo danke al la Merle Haltrecht-Matte kaj Suzanne Caron-Richer. MEKARO alterne translokiĝas inter tri urboj (Toronto, Otavo kaj Montrealo) kaj jen estos la vico de Montrealo kaj de ESK pretigi tiun turisman amikecan semajnfino en Esperanto.

La dua evento okazos por la sepa jaro, la Semajnfino por Esperanto kaj biciklado. Laŭ mia scio ĝi estas unika tia speco Esperanto-evento en la Amerikoj. Jam delonge oni biciklas Esperante tra

Eŭropo, danke al BEMI (Biciklista Esperanto-movado internacia) sed malofte en nia kontinento. Nu, en Montrealo komence de junio okazas biciklista festivalo, do, kial ne kunigi al tio Esperantistan eventon? Se vi ŝatas bicikli, vi estas bonvena partopreni en tiu etosa biciklado. Memoru, tio ĉiam okazas dum la unua semajnfino en junio.

Laste, temas pri la plej grava evento, fakte multe pli granda kaj cetere pli internacia ol la unuaj du. ESKo invitas la Amerikan Esperantistaron al la 7^a Tutamerika kongreso de Esperanto (TAKE). Certe temos pri la plej vasta Esperanto-evento dum la lasta jardeko kaj samtempe okazos la 56^a landa kongreso de la Usona Esperanto-ligo (ELNA). Jam loka kongresa komitato aktivigas pri trovi kongresejon, pretigi programon,

decidi pri ekskursojn kaj vizitojn kaj multe pli. Nepre konsideru vian partoprenon, vi certe ne bedaŭros. Imagu dum semajno, povi diskuti, amuziĝi, lerni, kaj tiel plu, kun Kubanoj, Meksikanoj, Brazilanoj sed ankaŭ kun Esperantistoj el diversaj partoj de Usono kaj Kanado. Jen la datoj pri memori de la 12-18^a de julio 2008. Vi certe reaŭdos pri ĝi.

Mi invitas vin regule konsultinian retejon por trovi aktualajn informojn (www.esperanto.qc.ca) kaj eventuale aliĝi.

Kompreneble ni bonvenigas viajn ideojn kaj vian kunlaboron al la organizado de la tri eventoj. Dum 2007-2008 Montrealo estos pli Esperanta!

Le Fleuve en ligne!

Boris-Antoine Legault

La Société québécoise d'espéranto innove! Plusieurs anciens numéros de La Riverego, le magazine bilingue officiel de la Société, sont maintenant disponibles sur Internet, en format .pdf, à l'adresse suivante: www.esperanto.qc.ca/riverego.htm. Les numéros subséquents seront disponibles en ligne au plus tard un mois après la publication papier. Les espérantophones du monde entier ainsi que les gens d'ici pourront ainsi par un simple clic découvrir la perspective de la Société québécoise d'espéranto et de ses membres !

Skribu al Avo Frosto, li respondos... ankaŭ en Esperanto!

Normand Fleury

Kristnasko 2006 alvenas kaj kiel ĉiun jaron, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj, ricevas respondon el la Norda Poluso. Ekde 2002, la geinfanoj, kiuj skribas al Avo Frosto en Esperanto, ricevas respondon en tiu lingvo.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo proponante la uzon de Esperanto por komuniki kun la Esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK. Esperanto estas inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj de siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon. ESK-o invitas ĉiujn Esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto.

Simple sendu manskribitan leteron al la jena adreso:

Avo Frosto
Norda Poluso
Canada HOH OH0

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj, kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon, adreson kaj la vorton Esperanto por certigi ricevon de respondo Esperante.

P.S. Foje Avo Frosto eraras kaj ne respondas en Esperanto ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo. Se bedaŭrinde tio okazos al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭe sendu retmesaĝon al ni informo@esperanto.qc.ca kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo kaj klopodos trovi solvon. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

Ni savu Radio-Polonia

Sylvain Auclair

La Esperanta Redakcio de Pola Radio kaj la Universala Esperanto-Asocio invitas la mondan Esperantistaron apogi siajn klopodojn savi la Esperantajn elsendojn el Pollando (dissendatajn al la tuta mondo). La Pola Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj nun konsideras la eblecon ĉesigi ilin. Tuj kontaktu, france, angle aŭ pole, la oficialajn reprezentantojn de la Pola Respubliko:

**Ambassade de la
République de Pologne**
443, avenue Daly
Ottawa ON K1N 6H3
ottawa@polishembassy.ca

**Consulat général de la
République de Pologne**
1500, avenue des Pins Ouest
Montréal H3G 1B4
konsulatrp@citinet.net

Reta Riverego!

Boris-Antoine Legault

Esperanto-Societo Kebekia eniras la modernan mondon! Pluraj malnovaj numeroj de nia dulingva gazeto La Riverego nun elŝuteblas el nia retejo, en .pdf-formato ĉe : www.esperanto.qc.ca/riverego.htm. Ekde nun, ĉiuj numeroj rete publikiĝos plej malfrue unu monaton post la papera eldono. Esperanto-parolantoj el la tuta mondo kaj ankaŭ ĉiuj kebekianoj povos per simpla musklako malkovri la perspektivon de nia organizo kaj de ĝiaj membroj !

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
sab. 16a dec. 2006	Botanika Ĝardeno †	18 h	Decembra Festo kaj komuna bufedo
ven. 26 ^a jan. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
ven. 23 ^a feb. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
ven. 30 ^a mar. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
ven. 27 ^a apr. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
19-21 ^a maj. 2007	Montrealo		5 ^a MEKARO
ven. 25 ^a maj. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
1-3 ^a jun. 2007	Montrealo		SEBO (Semajnfino Esperantista de Biciklado)
ven. 29 ^a jun. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
ven. 28 ^a sep. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
5-8 ^a okt. 2007	Silvero (Usono)		ARE. Detaloj : vidu ĉe www.esperanto.qc.ca
ven. 26 ^a okt. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
ven. 30 ^a nov. 2007	MEDO **	19 h	Elektota temo
sab. 15 ^a dec. 2007	Ejo elektota	18 h	Decembra Festo kaj komuna bufedo

**** Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique) :** 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement payant

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. En voici les coordonnées.

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca

McGill Esperanto Club: mcgill@esperanto.qc.ca

Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

MEMO, Montreala Esperanta Movado : www.esperanto-montreal.org

Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca